Raporto pri Lokaj Grupoj

La plano pri lokaj grupoj, kiun la Laborplano esprimas, ne disvolviĝis laŭ intenco pro manko de sufiĉe gvideco kaj puŝado de la prezidanto. En la pasinta jaro ni dividis la landon en ses regionojn, por ke regiona estro povu komuniki pli facili kun ĉiu loka grupo. Ni daŭre serĉas volontulon por kelkaj regionojn.

La oficiala listo de lokaj grupoj aperas en nia retpaĝaro, kie troviĝas:

Sudokcidento: 25 grupoj en 8 ŝtatoj (el 10 ŝtatoj entute en la regiono)
Mezatlantiko: 9 grupoj en 6 ŝtatoj (el 10 ŝtatoj entute en la regiono)
NovAnglujo: 8 lokaj grupoj kaj 1 regiona grupoj el 3 ŝtatoj (7 ŝtatoj entute en la regiono)
Nordcentro: 14 lokaj grupoj el 6 ŝtatoj (9 ŝtatoj entute en la regiono)
Nordokcidento: 7 lokaj grupoj el 5 ŝtatoj (6 ŝtatoj entute en la regiono)
Sudoriento: 10 lokaj grupoj el 6 ŝtatoj(9 ŝtatoj entute en la regiono)

Entute ekzistas 73 lokaj grupoj. Ni ankoraŭ havas kelkajn grandajn urbojn sen loka grupo. Tamen, 73 montras kreskadon.

Loka grupo komenciĝas per unu aktivulo, kiu konsentas esti la kontaktulo por tiu urbo. De tio, loka grupo stariĝas. Se ne ekzistas loka grupo en via urbo, nepre kontaktu nin (filipo@grupoj.org), kaj via kontaktinformo aperos en nia retpaĝaro kiel nova grupo!

La plej grava faktoro por kreskanta loka grupo estas ke la esperantistoj tie deziras fari ion por la grupo kaj por la mondo. Oni povas fari tion eĉ sen granda sperto en la lingvo.

- Filipo DORCAS, julio, 2007